

La sekvaj 2 nocioj koncernas specojn de pantografo. Ties "brakoj" estas stangoj konsistigantaj framon de kurentodeprenilo. Laŭ la bildoj la pantografo 06030 havas tri, la pantografo 06025 ok brakojn. Sekve malĝustas la adjektivoj „unubraka“ kaj „dubraka“.

**06030** Kurentodeprenilo por supertrakaj kontaktlineoj, ĉe kiu sur nur unu malsupra brako de framo troviĝas du supraj brakoj portantaj arĉon.


bulgara *еднораменен пантограф*  
 ĉeĥa *polopantografový sběrač*  
 dana *enarmet strømaftager*  
 franca *pantographe à cadre simplifié*  
 germana *Halbscherenstromabnehmer*  
 hungara *félpantográf áramszedő*  
 itala *pantografo ad un braccio*  
 kroata *asimetrični pantograf*  
 pola *odbierak prądu połówkowy*  
 rumana *pantograf cu semifoarfece*  
 slovena *enokraki tokovni odjemnik*  
 Esperanto ĝis nun: pantografo unubraka



pantografo 06030

**06025** (sen UIC-difino)

bulgara *пантограф двураменен*  
 ĉeĥa *pantografový sběrač*  
 dana *toarmet strømaftager*  
 franca *pantographe pentagonale*  
 germana *Scherenstromabnehmer*  
 hungara *kettős karú áramszedő*  
 itala *pantografo a due bracci*  
 kroata *simetrični pantograf*  
 pola *pantograf dwuramienny*  
 rumana *pantograf foarfece*  
 slovena *tokovni odjemnik v obliki romba*  
 Esperanto ĝis nun: pantografo dubraka



pantografo 06025

Jen po 4 terminaj ŝanĝproponoj:

	<u>propono 1</u>	<u>propono 2</u>	<u>propono 3</u>	<u>propono 4</u>
06030	<b>pantografo duonframa</b>	<b>p. tondilforma</b>	<b>p. nesimetria</b>	<b>p. unuflanka</b>
06025	<b>pantografo tutframa</b>	<b>p. pentagona</b>	<b>p. simetria</b>	<b>p. duflanka</b>

Ĝis sekva korespondo amike salutas  
 Heinz Hoffmann kaj Guido Brandenburg.



desegnaĵo de Dieter HARTIG

## Terminara Kuriero

TeKu 150

Februaro 2015

### Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør  
 Poŝtelefono: +45 71 70 63 83 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul  
 Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: hoffmann-ifef@kabelmail.de



#### NEKROLOGO

Kun profunda kordoloro ni sciigas, ke *Heinz Diedrich „Dieter“ Hartig* 86-jaraĝa 5-an de Novembro 2014 mortis. Jam ekde juna aĝo li partoprenis en la fervojista Esperanto-movado kaj portis freŝan venton en la vivo de Terminara Komisiono. Por kunordigi la taskojn, *Dieter* en 1976 instalas Terminaran Kurieron, kiun li redaktis ĝis numero 109 en 1999. Preskaŭ ĉiun numeron li ilustris per amuza desegnaĵo. Helpe de komputilo kaj nadloprintilo, kiujn *Dieter* aĉetis en 1986, unu jaron post emeritiĝo, kaj „aŭtodidakte

majstrita” programado li kondukis projekton de “Fervoja Terminaro en Esperanto” al sukcesa apero en 1989, samtempe kun la aktualigita (kvara) eldono de la *UIC*-terminaro. En 1990/1991 li gvidis Terminaran Komisionon, kaj ĝis lastatempe estis aktiva kunlaboranto en Terminara Sekcio de Faka Komisiono. Profesie kiel sperta lokomotivestro li ankaŭ instruis kaj trejnus kondukajn komencantojn. Li verkis multajn gravajn fakartikolojn kaj belartajn skribaĵojn, laste ekzemple “flugantaj folioj”, kolekton de glosoj pri vivo kaj mondo: „Hodiaŭ mi rigardis min en spegulo. Mi devas diri: La hodiaŭaj speguloj ne estas tiel bonaj kiel la iamaj”. Pro lia entuziasma agado li ricevis honorigojn: en 1988 „Ora FISAIC-medalo”, kaj en 2001 „Honora Membro de IFEF”.

Ni klinigu niajn kapojn antaŭ la memoro de *Dieter Hartig*. Li ripozu en Paco!

#### Kontribuoj al taskoj en TeKu 149

Ĝis nun alvenis kontribuoj de *Guido Brandenburg*, *Ladislav Haki*, *Tibor Kristály*, *Jaroslav Matuška*, *Erik Mortensen* kaj *Jan Uldal Niemann*. Elkoran dankon al ili. Jena listo montras iliajn elektojn:

<b>04050</b>	1-foje <b>bremsado lantiga</b>	<b>14740</b>	3-foje <b>interfacmodulo</b>
	1-foje <b>bremsado senhaltiga</b>		<b>traksistemadapta</b>
	1-foje <b>bremsado malakcela</b>		1-foje <b>adaptilo nacispecifa</b>
	1-foje <b>bremsado rapidredukta</b>		2-foje <b>sistemadaptilo</b>
<b>06731</b>	4-foje <b>regejo relajsa traskema</b>		<b>specifa trakflanka</b>
	2-foje <b>regejo relajsa trakplana</b>	<b>14741</b>	3-foje <b>interfacmodulo</b>
<b>07372</b>	2-foje <b>trajntrafikreguligisto</b>		<b>veturila</b>
	3-foje <b>trajntrafikdisponisto</b>		1-foje <b>adaptilo</b>
	1-foje <b>trajntrafikkontrolisto</b>		<b>veturilspecifa</b>
			2-foje <b>sistemadaptilo</b>
			<b>specifa veturilflanka</b>

**Karaj gekolegoj**, ĉar ĉe la kongreso en *Kunming* partoprenos nur malmultaj eŭropanoj, tie ne okazos terminara kunveno. Sekve neceso decidi pri terminoj enigendaj en la *UIC*-terminaron nur per Interreto. Kompreneble ankaŭ eblas sendi normalan leteron. Do ni ege petas, ke pri la sekvaj taskoj pli multaj gekolegoj sendu sian kontribuon. Ankaŭ kiuj ĝis nun ne sendis opinion pri taskoj en TeKu 149, estas petataj pripensi kaj respondi. La kontribuoj alvenu ĝis fino de Aprilo. En Majo aperos nur unupaĝa TeKu 151 kun ĉiuj viaj elektoj de plej taŭgaj terminoj, kiel bazo de decido.

### Kelkaj novaj taskoj

La unuaj 4 nocioj koncernas regionan fervojlinion kun maldensa trafiko, kie kutime ne troviĝas surloka personaro. La trajntrafikon - precipe ties sekurigon - gvidas decentre kompetentulo, kiu ĝenerale samtempe funkcias kiel trajntrafikestro de grava stacio – pleje ĉe komenco de la linio. Tiu fervojisto laŭ difinita skemo (veturpermeso, alvenanonco, itinersekuriga anonco k.a.) komunikas kun la trakciilkondukistoj veturantaj sur la koncerna linio. Ties funkcio kiel raportantoj pri la aktuala situacio signifas certagradan dividon de la responso. Pro tio la rolo de la loka gvidanto diferencas de la rolo "trajntrafikestro", kiu mem laboras surloke aŭ – subtenita de teknikaj sistemoj – kvazaŭ surloke kaj por sia distrikto portas la responson sole.

La suba bildo montras signalplaton, kiu anstataŭas enveturan signalilon ĉe koncerna linio. En pluraj landoj ĝi estas tiel trapezforma.

**09819** Fervojlinio unutraĉa kun organizado de trafiko por nur loka signifo.

ĉeĥa	<i>jednokolejná trať se zjednodušeným provozem</i>
dana	<i>enkeltspor med begrænset trafik</i>
franca	<i>voie unique à trafic restreint</i>
germana	<i>eingleisige Strecke mit vereinfachtem Nebenbahnbetrieb</i>
hungara	<i>egyvágányú vonal egyszerűsített üzemiivel</i>
itala	<i>semplice binario a traffico ristretto</i>
kroata	<i>jednokolosiječna pruga s ograničenim prometom</i>
pola	<i>linia jednotorowa o uproszczonej organizacji ruchu</i>
rumana	<i>linie simpla cu trafic redus</i>
slovena	<i>stranska enotima proga z manjšo količno prometom</i>
Esperanto ĝis nun:	linio unutraĉa kun simpligita ekspluatado



germana signalplato *Ne1*

**01548** (sen *UIC*-difino)

bulgara	<i>диспечер на влаково направление</i>
ĉeĥa	<i>dirigující dispečer</i>
dana	<i>FC leder</i>
franca	<i>chef de ligne</i>
germana	<i>Zugleiter</i>
hungara	<i>forgalomirányító</i>
itala	<i>dirigente unico</i>
kroata	<i>prometnik u nadzornom kolodvoru</i>
pola	<i>dyżurny ruchu linii jednotorowej</i>
rumana	<i>regulator de circulație</i>
slovena	<i>prometni odpravnik</i>
Esperanto ĝis nun:	trajntrafikestro linia

**01344** (sen *UIC*-difino)

bulgara	<i>дирекция "Влаков трафик"</i>
ĉeĥa	<i>místo stavění výhybky</i>
dana	<i>overvågningscenter</i>
franca	<i>centre de surveillance</i>
germana	<i>Zugleitstelle</i>
hungara	<i>állomásirányítói központ</i>
itala	<i>centro di sorveglianza</i>
kroata	<i>nadzorna služba u kolodvoru</i>
pola	<i>posterunek kontrolny</i>
rumana	<i>post de supraveghere</i>
slovena	<i>postajno nadzorništvo</i>
Esperanto ĝis nun:	trajntrafikestro linia

**03628** (sen *UIC*-difino)

bulgara	<i>контрольор на всички линии</i>
ĉeĥa	<i>řízení provozu dispečerem</i>
dana	<i>drift på strækning med forenklet togstyring</i>
franca	<i>exploitation par chef de ligne</i>
germana	<i>Betrieb auf Strecke mit vereinfachtem Nebenbahndienst</i>
hungara	<i>egyszerűsített mellékvonali forgalmi szolgálat a vonalfőnök irányításával</i>
itala	<i>esercizio con dirigenza unica</i>
kroata	<i>vožnja vlaka na sporednoj pruzi</i>
pola	<i>prowadzenie ruchu przez dyspozytora odcinkowego</i>
rumana	<i>exploatare pe secție cu trafic redus in regim de conducere centralizată</i>
slovena	<i>promet na stranski progi</i>
Esperanto ĝis nun:	ekspluatado per linia trajntrafikestro

Jen po 2 terminaj ŝanĝproponoj:

	propono 1	propono 2
09819	fervojlinio regiona kun simpligita trajntrafiko	f. r. k. s. trajnsekurigo
01548	gvidanto de regiona simpligita trajntrafiko	g. d. r. trajntrafiko
		kun simpligita sekurigo
01344	gvidejo por regiona simpligita trajntrafiko	g. p. regionlinia
		simpligita trajnsekurigo
03628	trajntrafiko regiona simpligita	trajnsekurigo regionlinia
		simpligita



gvidanto laŭ 01548 laboranta

## TeKu 150 suplemento

Ladislav Hakl kaj Jaroslav Matuška sendis aldonajn proponojn por terminoj de nociokomplekso 09819, 01548, 01344, 03628 en TeKu 150, sur paĝoj 2/3.

Unue ili volas koncizigi la terminojn per rezigno pri la adjektivo "regiona", kvankam vere temas nur pri regionaj (alivorte: neĉefaj) fervojlinioj.

Due la esprimo "simpligita trajntrafiko" estu precizigota al "simpligitaj trajntrafikreguloj".

Jen ripeto de proponoj 1, 2 en TeKu 150 kaj la aldonaj proponoj 3, 4:

### PROPONO 1 PROPONO 2

09819 fervojlinio regiona f. r. k. s. trajnsekurigo kun simpligita trajntrafiko

01548 gvidanto de regiona g. d. r. trajntrafiko simpligita trajntrafiko kun simpligita sekurigo

01344 gvidejo por regiona g. p. regionlinia simpligita trajntrafiko simpligita trajnsekurigo

03628 trajntrafiko regiona simpligita trajnsekurigo regionlinia simpligita

### PROPONO 3 PROPONO 4

09819 fervojlinio fervojlinio kun simpligitaj kun simpligita trajntrafiko trajntrafikreguloj

01548 gvidanto de gvidanto por trajntrafiko simpligita trajntrafiko laŭ simpligitaj reguloj

01344 gvidejo por gvidejo por trajntrafiko simpligita trajntrafiko laŭ simpligitaj reguloj

03628 trajntrafiko simpligita trajntrafiko laŭ simpligitaj reguloj.

Mi petas ankaŭ tiujn kolegojn, kiuj jam sendis sian preferon, denove pripensi, ĉu ŝanĝi ĝin pro la novaj proponoj.

Limdato fine de Aprilo restas.

Afable antaŭdankas kaj salutas Heinz Hoffmann.